

FENIKSO



INFORMILO POR

AMIKA

RONDO DE

ESPERANTAĴ-

KOLEKTANTOJ



Redaktas: R. Jensen, Sdr. Ringg. 77, DK-8000. Århus C

Nr. 11. 1. 9. 1970

Dua jaro nr. 6

4 TIPOJ DE LA MONAKA E-STAMPO

Ĉiu meĥanika poŝtstampilo konsistas de 2 moveblaj eroj: la ronda datstampo kaj la varb-stampo (aŭ sistemo de ondlinioj).

Jam antaŭ 15 jaroj - por plenumi la dezir-ojn de la filatelistoj kaj de la kolektantoj de meĥanikaj poŝtstampoj - la franca poŝtadmi-nistracio akceptis, ke la ordigo de la 2 eroj estu: la datstampo je dekstre (do sur la pm.) la varbteksto maldekstre.

Sur la plejparto de la stampmaŝinoj nun funk-ciantaj en Francujo estas eble ŝanĝi la ordon de la 2 partoj de la stampilo, sed adaptanta la ĉi-supran ordon, la avantaĝoj estas: la poŝtmarko ne estas tro makulata per tekst-oj aŭ desegnoj. La reklamteksto estas klare leg-ebla. Tio estas valora ne nur por la kolektan-toj de tiaj filatelaĵoj sed ankaŭ por la men-dantoj de la reklam-stampiloj.

En februaro 1970, subite kaj senatende, la

franca poŝtadministracio decidis, ke la ordo de la 2 eroj de ĉiu meĥanika poŝtstampo estu la kontraŭa: je dekstro la reklamteksto (do sur la pm.), la datstampo maldekstre.

La oficiala kialo estas, ke la datoj de la elsendo de diversaj poŝtaĵoj ne estas ĉiam klare legeblaj, kiam ili trafas la poŝtmarkon, kaj sekve eventualaj administraciaj kontroloj ofte ne estas eblaj.

La ĝenerala poŝtdirekcio sendis cirkuleron al ĉiu poŝtofico, kiu uzas meĥanikan stampmaŝinon, kaj fine de februaro preskaŭ ĉiuj poŝtoficoj ŝanĝis la ordon de la funkciantaj stampiloj.

Princlando Monako sekvas la ĝeneralajn regulojn de la franca poŝtadministracio. La monaka poŝto do aplikis la novan regulon, kaj, la 2-an de marto 1970, -unua tago de la uzo - aperis la unua tipo de la Esperanto-varbstampo laŭ la nova fiksita prezento.



1-a tipo



En Francujo, senprokaste, akra reakcio eksplodis, ne nur de la filatelistoj kaj "markofiliistoj" sed ankaŭ de la kongresorganizantoj, urbeŝtraroj k.t.p., kiuj pagis altajn sumojn por la uzo de reklampoŝtstampoj, kies teksto estas nun nelegebla kaj, konsekvence, la propa gandcelo estas forfuŝita.

Feliĉe mi ricevis kelkajn kovertojn stampitajn la 4-an de marto, laŭ la nova prezento. Mi ilin sendis al nia sindonema amiko Tichý por la Stampo - Servo.

Poste mi deziris akiri kelkajn pluajn kovertojn kaj kartojn, ĉar sufiĉe malmultajn mi ricevis la unuan fojon.

Je mia granda surprizo alvenis kelkaj kartoj kies prezento de la varbstampo ŝanĝis kompare al la unue ricevitaj ekzempleroj. Ergo naskiĝis la dua tipo:



2-a tipo



Ĉiujn deziratajn klarigojn mi legis en la aprila numero de la grava franca filatela revuo "La mondo de la filatelistoj" en artikolo titolita: "Renverso de la reklampoŝtstampoj-Monako diras NE!".

Kvankam ĝi aplikas la ĝeneralajn regulojn de la franca poŝtadministracio, Monako ĝuas veran sendependecon, kaj konsiderante la neferoran eĥon ricevita post la ŝanĝo de metodo, kiu ĝis nun kontentigis ĉiujn, la monaka poŝtadministracio decidis denove reuzi la plej kontentigan prezenton.

La E-reklamstampo funkciis de la 2-a de marto ĝis la kongreso, sed nur alterne kun aliaj

varbstampoj. Dum kelkaj tagoj ĝi ne plu funkciis (ĝis la 3-a de majo).

Ankoraŭfoje mi estis tre bonŝanca, ĉar mi ricevis la stampon de la 4-a de majo, - Novan korbato mi havis, ĉar mi povis noti la aperon de tria tipo:



3-a tipo

Vi mem povas facile rimarki ke la ronda datstampo estas ŝanĝata (kial mi ne scias).

La literoj estas multe pli grandaj.

Finfine mi povas klarigi al vi, ke kvara tipo ankaŭ ekzistas, sed tio estas "alia historio"

La gravaj firmaoj, revuoj, ĵurnaloj k.t.p., kiuj regule sendas amason de presaĵoj, periodaĵoj k.s., ĝuas apartan sendsistemon. Vi certe jam rimarkis, ke periodaĵoj kiujn vi ricevis ne estis afrankitaj, sed -tamen- vi nenion pagis je la alveno. En Francujo, kaj ankaŭ en Monako, post interkonsento kun la poŝtadministracio, la sendantoj de periodaĵoj rajtas sendi, kontraŭ opa antaŭfiksita prezo, la materialon sen anticipa afranko. La poŝtaĵoj devas esti deponitaj aparte de la regulaj leterkestoj aŭ giĉetoj. La poŝtisto ilin stampas per stampilo, kies teksto estas tute malsama kompare al la ordinaraj

Dat-stampiloj. Pluraj tipoj de tiaj stampiloj ekzistas, sed la plej uzata indikas la signon "P.P.", kiu franclingve signifas "Port Payé" (sendkostoĵ jam pagitaj). Memkompreneble la koncernaj poŝtaĵoj ne rajtas esti afrankitaj per poŝtmarkoj.

Imaguke la monaka E-varbstampo ekzistas ankaŭ kun tiu ronda datstampo "P.P."

Mi ĝin ricevis, hazarde, kun ege granda ĝojo. Nur sur komercpoŝtaĵoj estas eble trovi la kvaran tipon, ĉar estas absolute necese, ke sur la koverto estu presita: la nomo kaj adreso de la send-firmao, kaj la referenco de la aprobo de la administracio. Juĝu vi mem kiel aspektas la kvara tipo:



4-a tipo



Bonvolu noti ke la datstampo P.P. ne ekzistas kun la varbteksto dekstre.

Resume: 4 tipoj de la koncerna E-stampo ekzistas. Almenaŭ unu - la kvara - ne estas facile akirebla, ĉar privatulo ne povas plenumi la devigajn kondiĉojn por mendo. Ni nur povas esperi ke filatelistoj trovas kelkajn alvenintajn kovertojn en kontoroj kaj savas ilin de la kutima pereado kaŭze de la foresto de pm.

Mi esperas, ke tiuj detaloj interesas vin, ili estas pruvo, ke eĉ nia modesta temo "Esperanto kaj Filatelo" necesas seriozan esploron.

Jean Amoureux

PRI KATALOGADO DE STAMPOJ

Por klasifiki la poŝtmarkojn en aŭ pri Esperanto aperis pluraj nuancoj ĉe la kolektantoj. Same ankaŭ por la stampoj, kiuj havas rilaton kun Esperanto. Ŝajnas ke malsamaj vidpunktoj ekzistas. - Jen mia koncepto de la problemo:

Antaŭ ĉio ni estas Esperantistoj, kaj mi opinias, ke ĉio kiu havas oficialan poŝtan originon kun Esperanto-rilato estas kolektinda kaj plenrajte apartenas al nia kolekto. Ni ne rajtas neglekti kolektobjektojn, kiuj havas la spuron de la oficiala enkonduko de Esperanto por la uzo de la poŝto.

Tamen la katalogo devas klasifiki la stampojn konsiderante ne la prezenton de la stampo - sed nur la celon de la stampo.

En la kadro de eventuala reeldono de poŝt-stampa katalogo mi antaŭvidas 3 grupojn de la stampoj.:

- 1) porokazaj stampoj
- 2) afrankstampoj
- 3) markofilio kaj apartaĵoj de la poŝto.

1) Porokazaj stampoj en aŭ pri Esperanto

estas la plej vasta grupo de nia kolekto.

Ĝi inkluzivas:

- la permanajn nuligstampojn
- la permanajn apudstampojn
- la meĥanikajn stampojn (maŝin-stampoj)

Ne estas necesa ilin diferenci, ĉar ĉiuj estas uzitaj ĉu por memorigu ĉu por varbi en aŭ pri Esperanto.

2) Afrank-stampoj

Ili ricevas poŝtan aprobon, sed la uzo estas nur privata. Ni povas konsideri ilin kiel "duonoficialaj", kaj ni devas teni ilin en aparta grupo.

3) Markofilio kaj apartaĵoj de la poŝto

- a) markofilio. Nur 2 stampoj estas ĝis nun konataj: la dulinia stampo roma de 1935. kaj la porregistrita stampe de Varsovio 1937.
- b) apartaĵoj de la poŝto. Ĝis nun nur unu ni povas enlistigi: la nederlanda etiketmarko laŭ la senco, kiun ni ordinare konas, sed ĝi anstataŭas poŝtan stampon de la sama tipo kiel la pola de 1937.

Mi estas konvinkita, ke tiu 3-a grupo meritas nian plenan atenton, ĉar tiuj stampoj estis uzataj por la profesia interna laboro de la poŝto (do, grave por ni Esperantistoj) kaj ne nur por la komplezema plezuro de la filatelistoj. En ĉiuj grupoj la landoj estus skribataj laŭ la alfabeto ordo, kaj en ĉiu lando ĉiu stampo havus propran numeron laŭ la kronologia ordo.

Estas, laŭ mi, la plej taŭga metodo. Jen mi prezentis planon por katalogado - sed finfine la lasta vorto restos je la kolektanto, kiu povas akcepti aŭ rifuzi detalojn laŭ sia persona koncepto.

□□□□

Jean Amouroux

BURMEISTER MENCIAS

Dum tuta monato septembro en poŝtoŝtanco Karl-Marx-Stadt 1, estos uzata maŝinstampo pri "Esperanto Treffen Karl Marx Stadt 1970" (Unua kongreso de Esperanto en GDR). La organizantoj de la kongreso, kiuj mendis tiun stampon ĉe la poŝto, devis pagi 400 markojn por ĝi.

Al ĉiuj AREK-anoj mi sendos tiun stampon.

De 4-11. okt. 1970 okazos en Karl Marx Stadt ekspozicio de Germana Kulturligo. En ĝia kadro ankaŭ troviĝos granda Esperanto-ekspozicio.

Responso por tiu E.eksp. estas mi.

Mi invitas ĉiujn AREK-anojn viziti tiun ekspozicion. Tiel ni denove povus ĉiuj renkontiĝi kaj kunveni. Por la partoprenontoj mi preparas interesan programon kun ekskursoj, kunvenoj kaj

agablaj vesperoj. Interesuloj tuj kontakti min.
Tiu invito validas nur por AREK-anoj kun fami-
lianoj.

Laŭ sciigo de organizanto de IREN (Abaliget) poŝta stampo ankaŭ estis uzita en 1968, mi ne sciis pri ĝi, kaj ankoraŭ ne vidis ĝin. Ĉu vi? Eble iuj posedas ĝin? Mi bezonus nepre bildon por la nova Stamp-katalogo.

Tiu katalog-laboro jam baldaŭ atingos la finon. Jam ĉiujn fotokopiojn pri ĉiuj ĝis nun konataj stampoj mi havas. Ankoraŭ mi nur prilaboras la polajn stampojn. Antaŭvideble en septembro la manuskripto estos preta. Tiam mi donos ĝin al eldonejo. La nova katalogo estos dulingva, germana - Esperanto, enhavos dulingvan fakterminaron filatelan kaj liston de ĉiuj ĝis nun aperintaj pm inkl. polaj pk.

Krom ornamaĵ apudstampoj ankaŭ estos montrataj la koncernaj datstampoj, kiuj nuligas la pm. Reko-, TP - poŝtkontorajn, kaj afrankmaŝin-stampojn mi donos en suplemento. Tiel mi certe trafos la guston de ĉiuj.

Rudolf Burmeister,
DDR. 9033. Karl Marx Stadt
Wilhelm Wolff Str. 1.

FRANZ MAYER 86 - jara

La "Germana Esperanto-Revuo" skribis en nr. 6, junio 1970 pri nia ŝatata AREK-ano:

"La plej malnova esperantisto el Sudetlando, Franz Mayer, Frankfurt/Main, festis sian 86an naskiĝtagon la 2-an de majo. Li naskiĝis 1884 en Goldenöls, distrikto Trautenau, Bohemio, kie li estis komercisto kaj zoologia konservisto. En 1910 li lernis Esperanton kaj estis de 1910 ĝis 1938 membro de la germana Esperanto-asocio en Ĉeĥoslovakio kaj delegito de UEA. Li partoprenis la 13an Universalan Kongreson 1921 en Praha kaj la 11an Germanan Esperanto-kongreson 1922 en Breslaŭ, kie li salutis la ĉeestantojn

en la nomo de la germanaj esperantistoj en Bohemio kaj trovis grandan aplaŭdon, neforgeseblan por li ĝis nun.

Franz Mayer fervore kolektis Esperanto-glumarkojn kaj posedis en 1945 la duan plej grandan kolekton en la mondo (pli ol 8000 diversajn ekzemplerojn) kaj 10 albumojn kun bildkarlia promilita forpelo el la lando. Post la ekloĝo en Germanio li denove komencis kolekti Esperanto-glumarkojn kaj havas nun la plej kompletan kolekton en Germanio (pli ol 7000 ekz.) Krome li posedas pli ol 100 diversajn Esperanto-poŝtstampojn kaj preskaŭ ĉiujn Esp-poŝtmarkojn. Al la jubileulo ni kore gratulas kaj deziras ankoraŭ multajn jarojn en bona sano." □

-ooo0000ooo-

SVISAJ TUTAĴOJ

En lasta numero de Fenikso nia s-ano Frank Tichý skribis, ke li havas svisan tutaĵon, kaj ĉar li neniam antaŭe aŭdis pri ekzisto de tutaĵoj de Svisujo, li petis pri eventualaj pluaĵinformoj en tiu afero. Ankaŭ mi pri tiuj poŝtkartoj ĝis nun nenion sciis. Sed nun mi povas konstati, ke s-ro Tichý prave supozis, ke ekzistas serio de pk.j kun diversaj pejzaĝoj.

De kie mia certeco? Jes, jen mi ricevis similan poŝtkarton. Sola diverseco estas alia pejzaĝo. Sur mia: GRAUBUNDEN - Das schöne Ferienland. Nun restas ankoraŭ problemo: Kiom da diversaj, svisaj Esp-tutaĵoj ekzistas.

Janusz Mikulski

STAMPOJ 1970. (Daŭrigo)

- 5) SZCZECIN 1. 15/5. 1-a renkontiĝo de polaj esperantistoj. XXV jubilea jaro de la reveno de Szczecin al Pollando. (teksto en Esp)

- 6) Jönköping. 16/5 - 18/5. 64-a sveda Esp-kgr. ronda nigra teksto nur en Esp.
- 7) RIMINI. 16/5 - 22/5. 22-a IFEF-kgr. Granda, ronda, nigra. Teksto nur en itala lingvo.
- 8) KRAKOW 1. Pollando. 7/6. 100-a datreveno de 1^a naskiĝo de V. I. LENIN. Sen cirklo, nigra, portreto de Lenin kun jarCIFEROJ 1870-1970, sube grandaj literoj LENIN en Kraków. Teksto "100-a datreveno..." formas supre duoncirklon. Teksto nur en Esp.
- 9) OPAVA. Ĉeĥoslovakio. 3/7 - 7/7. 2-a Esperantista kultura festivalo (omaĝe 200-jara jubileo de Beethoven) ronda. nigra teksto ĉeĥa kaj Esp.
- 10) Poděbrady, Ĉeĥoslovakio, 4/7 - 12/7. 10-a jubilea renkontiĝo esperantista (kun int. ŝak-turniro.) ronda, nigra. teksto ĉeĥa kaj Esp.
- 11) Bialystok. 22/7 - 25/7. 2-a Kulturfestivalo de Esp-junularo. (apudstampo)
- 12) MIERES, Hispanio. 18/7 - 23/7. 30-a nacia E-kgr. ronda, nigra teksto nur hispana.
- 13) TAKATSUKI apud OSAKA. 25/7 - 26/7. 57-a japana E-kgr. ronda, ruĝbruna. Teksto japana kaj Esp.
- 14) AUGSBURG 1, Germanujo. 25/7 - 31/7. 43-a kgr. de SAT. ronda, nigra, teksto nur en Esp.
- 15) WIEN. 1/8 - 8/8. 55-a UK. Kvarangula stampo (V). Stampnumeroj: 1. 2. 3. 4.

Ĉiujn supre nomitajn stampojn (eble + nr. 11) liveros STAMPO-SERVO por abonantoj de novaĵoj dank'al oferemo de partoprenantoj de koncertaj okazaĵoj aŭ membroj de koncertaj landoj. Mi petas ĉiujn, kiuj sendas novan stampon aŭ sciigon pri ĝi, ke ili ĉiam precizigu la datojn, dum kiuj la stampojn oni uzis.

GLUMARKOJ 1970. (Daŭrigo)

- 10) Sveda E-kgr. Jönköping 16/5 - 18/5 1970.
(H)(45x25) trpk. fol. $2 \times 2 = 4$
Teksto kaj Esp-stelo. Verda
- 11) Abaliget, Hungarujo. Internacia Renkontejo
de Esperantistaj Naturamikoj. IREN
eldonis 2 samfoliajn markojn.
(V)(35x41) ne-dent. fol.
Sur ambaŭ en centro granda E-stelo kun domo.
a) IREN en ĉiu julio. bruna kaj verda
b) 3-a IREN 18 - 28/7 1970, ruĝa kaj verda.

GLUMARKOJ 1971.

- 1) 36-a NZ kongreso de Esperanto. Jan. 8-12
1971. Auckland, Nov Zelando.
(H)(pap. 57x37. nigre trpk. fol. $1 \times 3 = 3$
en kajeroj kun po 8 folioj.
Nigra teksto. Verdaj stelo kaj monto.
- 2) 50-a kongreso de FLE. Den Haag, 27 - 28 de
marto 1971. (V)(43x59) trpk. fol. $4 \times 2 = 8$.
Desegnaĵoj de la malnova kastelo kun la
Ridderzaal - kaj la urba blazono (ĉikonio).
Nigra teksto kaj verda stelo.
- 3) 23-a kongreso de IFEF, Maribor (Jugoslavio)
15 - 21 majo 1971. (V)(26x38) dent. fol.
Blazono. nigra kaj verda.
La marko troviĝas ankaŭ presita sur koverto
de tre nepraktika formato: (H)(230x110)
- 4) 44-a kongreso de S.A.T. Parizo, 31. julio-
6. aŭg. 1971. (V)(33x47) trpk fol. $6 \times 3 = 18$.
Stilizita bildo de fontano kaj Eifel-turo.
Blua, verda kaj ora.
- 5) 56-a universala kgr. de Esp. London.
31/7 - 7/8 1971. (K)(pap. pr. 43x43)
trpk. fol. $2 \times 5 = 10$. Ronda teksto ĉirkaŭ
flugilhava arkpafisto. Nigra kaj olivverda
- NB. Glumarko por la 57a UK en Portland, Oregon
USA 1972 jam estas eldonita. Fol. $2 \times 5 = 10$. □

Asocia sciigo

Tiu ĉi numero de Fenikso devus laŭ la plano esti la lasta en la kotizjaro 1969 - 70. - sed ĉar la "jarŝanĝo" en aŭtuno - la unuan de oktobro - estas iom nenatura, ni en la "estraro" interkonsentis longigi nian duan kotizjaron ĝis la fino de la kalendara jaro 1970, kaj nur komenci nian trian kotizjaron la 1-an de januaro 1971, tiel ke nia kotizjaro estonte sekvas la kalendaran jaron.

Ni esperas, ke tiu ordo plaĉas al ĉiuj membroj, ĉar tiamaniere ili ricevas ja tutan kvaronjaron senpage.

Ni povis fari tion nur pro la bona helpo, kiun ni ricevas de nia Stampo-Servo. Por nia modesta kotizo ni ne povus sendi pli ol 3 numeroj jare, do la gajno de Stampo-Servo duobligas la kvanton de niaj elsendaĵoj.

Pro tio ni estas nia agema gvidanto de tiu servo tre dankaj.

La kotizo por jaro 1971 estos same kiel ĝis nun: 6 internaciaj respondkuponoj. Se vi ne povas havigi rkp, vi povos pagi per kompletaj serioj de memorigpoŝtmarkoj neuzitaj. Sed tiuokaze aldonu 50%. Do sendu pm de sama valoro kiel 9 eksterlandajn leterafrankojn.

La kotizo devas esti ĉe la afergvidanto Ivar Paulsson antaŭ la 15-an de januaro 1971.

Kiel lastfoje dirita ni povas akcepti kelkajn plurajn membrojn. Se vi konas kolektantojn en landoj de kie ni ne jam havas membrojn bonvolu rekomendi AREK al ili.

Artikoloj kaj mencioj al la venonta numero de nia informilo devas esti ĉe la redaktoro antaŭ la 1-an de novembro.

Reinhold Jensen